

PENSEO

N-ro 381

jul. / 2023

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Tiberio Madonna (Italio)



Somero en la kampoj

La radioj de l' suno
kunplektiĝas
formante spikojn orajn
kiuj vestas la kampojn
per lumo.

Kaj la birdotimigilo
bronzita de la horoj
elmontras fiera sian larĝan jakon
remburitan per pajlo
kaj per pacienco.

Unu nuboj nur
ĉirkaŭvagadas tra l' bluaĵo
serĉante malvarmeton,
sed de ombro refreŝiganta
eĉ ne l' ombro.

La ruĝo de l' papavoj
kaj la lazur' de l' cejanoj
inunditaj
de l' oro de l' tritiko
aperas ĉi kaj tie
konfuzitaj.

Du flugiloj de papilio
kun zigzaga iro
estas la nura elemento
moviĝanta
de l' pejzaĝo langvora.

La torpora silento

en la temp' de la siesto
estas rompata nur
de la kantado
alterna
de du cikadoj.



Ángel Arquillos (Hispanio)



Kion pensi

Kion pensi pri la mondo,
kie kun granda malĝojo
multaj homoj pretervivas?
Kion pensi pri la morto
kie la destino fiksas
nian nekonatan sorton?
Ĉu la viv' vere valoras?
Kion pensi pri la vojo
plena de truoj kaj dornoj?
Mi de tre longe sopiras
fluganta sur blankaj nuboj
sentime kun granda ĝojo,
sed kun duboj en la koro...

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Kornikoj nigraj en ĉiel' malhela,
Sed skribas Li pri najtingaloj.
Survojaj ŝtonoj kaj fosaĵoj,
Sed Li priskribas la florantan valon.

Li nur ektuŝas tre zorgeme
La vundojn, kiuj tre doloras,
Kun koro sia sangoplena
Pri la malĝojo fremda ploras.

La lingvo ofte ne kutimas,
Sed Li parolas per rideto,
Fermitaj pordoj kaj animoj
Eliron serĉas la birdeto.

Eĉ se en mond' senfĥine pluvas
Li provas plibeligi pensojn,
Kandel' eterna de Poeto
En nokt' malluma lumas versoj.

De iu tempo mi kolektas pensojn
Diverskolorajn, kiel la naturo,
Kiel ĉiel' somera, sunaj, helaj
Kaj tristaj, grizaj kiel la nebulo.

La pensoj pri doloro propra aŭ fremda,
Pri maljusteco, kiu ofte venkas,
Pri bonaj homoj, kiuj ne malmultas
Kaj pri espero, kiu ĉiam restas.

Mi lokas, fermas pensojn en la keston,
Sed ili buntas kaj protestas,
La nova tago mateniĝas
Kaj... novajn pensojn mi kolektas.

Moissej Bronshteyn (Rusio)



Traduko, kiu kastras verkon,
ja estas kvazaŭ putra kverk' en
arbaro pluvivanta sane,
se l'tradukista pripensad' ne
sukcesis kapti ĉe l' aŭtor'
plej gravajn sparkojn de humor'.

Ekde ĉi tie l'versa plumpo
videblas eĉ sen forta lampo,
kaj la traduk' efikas stinke

des pli se certas ni en fin' ke
ĝi tute ne proksimas al
enhavo de l' original'.

Do kreu min samideane:
— Tradukemul' elspezas vane
la tempon kaj la nervoĉelojn,
se ŝli ne havas certajn celojn,
Kaj eĉ se havas —sen eduk'
ne okupiĝu pri traduk'.

Ŝatanto de pensoj,
disipas mi pension
por venu sunaj semoj
en sortobedon mian.

Senpene pensoj miaj
penseajn sentojn spiras,
de l'farboj fantaziaj
feliĉon plu akiras.

Ne spertas la sinteno
tro sobre sekvi l'tagon
ĉe la pensea sveno,
spiranta sentan svagon.



Dum tridek jaroj precize
mi ĝuis vagi enmonde,
ĝojsento bolis en mi, se
alvenis danka reson' de
la homoj, kiuj min aŭdis,
atente l'vortojn kaptante,
ĉu kuno ligis nin, aŭ dis' —
ni nin komprenis kantante.

Vivanta nun mornepoke —
kovime kaj enmilite —
mi daŭre restas surloke,
sed plu atendante pli de
l'epoko jam postnovjara

irona, eble, alie
kun revo, ke l' mondo kara
akceptos min familie.

Perdinta vojon mian inter duonveroj,
mi vagas stulte en arbaro de mensogoj,
kaj daŭre plu aklamas al superaj sferoj,
kaj daŭre plu rezignas helpon de la
drogoj.

Pluvaĉ' novembra mian tristan koron
skoldas,
la gutoj bruas ritme kun mokado
kruda,
l'gutad' senĉesa flustras ke ja mi ne
solas,
vagante inter naŭza mensogar' apuda,


ke mi prudentu pacienci kaj toleri,
se bruta leĝo kontraŭstaron
malebligas,
ke l' duonveroj ne tro hastos
malaperi,
sed min al tiuj ja nenio iel ligas.

Kaj mi oponas en real' kaj efemero,
ke ne kontentas mi pri tia perspektivo,
mi volas ke en mia mondo regu vero,
kaj ke okazu ĝi dum mia tera vivo.

En tristo rutina fojfoje mi ŝatas retrovi
spegulon magian, en kiu aspektas mi juna,
kaj sen disreviĝo konjektas, ke flatas ne tro
vi,
dirante, ke bluas por mi la ĉielo katuna,
kaj tiu ĉi bluo promesas por onto cent mil da
eventoj fascinaj venantaj poeme kaj kante,
ĉar estas spegulo magia nun vi, mia milda,
mi certe juniĝas, kun danko al vi rigardante.



Liven Dek (Hispanio)



Ni kompatu nin

(Kantteksto)

Sur ĉevalo nigra
rajdas mia sento.
Sur ĉevalo blanka
ĝi flugu en la vento.

Nigras homaj horoj.
Mornas la futuro.
Vundita estas tero.
Ploras la naturo.

For ekspluatado.
Venu nova tempo.
Nepras solidaro
forĝita en silento.

Semo el respekto
elkore gvidu nin,
sur ĉevalo blanka
rajdante pli kaj pli.

Bonon celu ni.
Bestojn ni respektu.
Ni kompatu nin.
Nenion ni difektu.
Ne plu nian vivon
regu la mizer'.
Kresku niakore
nur amo kaj liber'.

Petro Palivoda (Ukrainio)



Mi kredas

(kantteksto)

La luno brilas sur la nokta ondo,
Kaj lumas hele steloj tra l'eter' ...
Ekdormu kalme, maltrankvila mondo,
Ripozu de malĝojo, kara Ter'.

Detruas vin militoj kaj suferoj,
 Turmentas vin malamo kaj dolor',
 Sed vivas tamen en la kor' esperoj
 Al via bona kaj feliĉa hor'.

Ni strebu al paco, infanoj de l' Tero,
 Aspiru la celon kun arda pasi',
 Per lingvo komuna kaj en harmoni'!
 Mi kredas je amo, feliĉo kaj vero!
 Homaro, mi kredas je vi!

Ni ofte flugas pense al ĉielo,
 Nin ebriigas alto kaj liber',
 Allogas nin kaj ravas Dia belo
 En ĉiu flor', nubeto kaj roser'.

Sed pafojn songas beb' en sia lito —
 Kaj super ĝi kliniĝas la patrin',
 Ŝi sian bebon gardas de milito,
 Kaj estas nia devo helpi ŝin.

Ni strebu al paco, infanoj de l' Tero,
 Aspiru la celon kun arda pasi',
 Per lingvo komuna kaj en harmoni'!
 Mi kredas je amo, feliĉo kaj vero!
 Homaro, mi kredas je vi!

Muziko de via anim'

(kantteksto)

Mi aŭskultos tre helan muzikon de via
 anim',
 se silentos pianoj, tamburoj, gitaroj,
 se mutece angora envolvos la teron,
 sen muziko malvarmo plenigos eteron,
 ĉiuloke regadas malĝoj' kaj deprim'.
 Se falegos la mondo de rev' al tartaro
 kaj ne savos ĝin certe la plej bela rim'
 kaj la sun' estingiĝos malantaŭ nubaro,
 Mi ne falos, mi haltos ĉe la lasta lim',
 ĉar aŭdiĝos tre hela muziko de via anim'.



Klaus Frieze (Germanio)



Senpova

Mi sentas min senpova.
 Okazas tiom multe.
 Nun estas mi senmovi
 kaj ploras nur singulte.

Mi timas pro malsanoj,
 pro krimoj kaj milit',
 pro tiom da skandaloj,
 eĉ ankaŭ pro l' moskit'.

Stultec' kaj malbraveco
 abundas en la mondo,
 kondukas al sklaveco.
 Englutos nin la ondo

de aĉaj diktatoroj,
 frenezaj kaj avidaj.
 Nur kaptas nin hororoj.
 Ni estas forlasitaj.

Do, venku la mizeron!
 Eĉ mankus la savant'
 Ne ŝatas ni inferon.
 Ne helpas la plorkant'.

Malfacilaĵoj

Malsekiĝanta, ŝanĝeliganta,
 edziniĝanta, malakceptanta,
 nekomparebla kaj prognozebla,
 neestingebla kaj rezistebla.
 Ĉu vi komprenas?
 Ĉu vi dormplenas?
 Ĉu atentema
 kaj interstela?

Nepriplorata, supertaksata,
 alkutimiĝinta,
 sunbruligita.
 Kial doloro?

Ne estas valoro.
Ne taŭgas la floro.
Tro frua horo.
Ba, ba, likvoro!

Ĉe la plaĝo

Onklino Lola, onklo Jan kun nepo Benjamin,
kaj ankaŭ pupo pelikan'. Renkonto kun
destin'.

Ĉe vasta mar', ĉe bela strand', bantuko en la
man'.

Ferioj por la tuta land'. Ripozo estas plan'.

La mildaj ondoj, varma vent'. Proksime
restu nur!

Profunda akvo, do atent'! En maro mankas
mur'.

Amuze estas, flugas temp'. Malsekas ĉiuj
nun,

kaj ĉiuj brilas de kontent' kaj iras al la dun'.

Tiom da homoj sur la plaĝ' kuŝantaj sur
bantuk'.

Ĉiu oleis, brunvizaĝ'. Bongustas fruktosuk'.

Bantukojn niajn serĉu vi! Rapidu onklo Jan!

Do serĉu bone, estas tri ĉe nia pelikan'.

Ho ve, ekvokas Benjamin. La pelikano for!

Ĝi estas for, ĉu halucin'? Aŭdiĝas laŭta ĥor'.

Serĉado dum la tuta hor'. Finfine la sukces'.

Trovita pup', ne estu plor'. Prenita sen
permes'.

Du fremdaj knaboj ludas nun' kun ĉarma
pelikan'.

Sen timo pro sekvanta pun' de pupa
akompan'.

Ne montras sin la tukoĵ tri. Kien rigardu nin?

Tre malesperaj estas ni! Ja mankas medicin'!

Finfine venas la feliĉ'. Laŭorde sur la lok'

bantukoj tri eĉ kun sandviĉ'. Sen tukoĵ estus
ŝok'.



Wally du Temple (Kanado)



Ĉi-tie mi emas verki poemojn laŭ
la stilo 'figurista' kiu bildigas ion
kun kiel eble plej malmultaj vortoj.

Anglaj poetoj kiel T.E.Hulme, F.S .Flint,
Ezra Pound kaj William Carlos Williams
estis inter la plej famaj adeptoj de tiu stilo en
la frua parto de la 20a jarcento.

Pri sia recenze aklamita poemo de mi
esperantigita:

“En Stacio de la Metroo. La aperaĵo de ĉi
mienoj en la homamaso: Petaloj sur malseka
nigra branĉo.”

Pound deklaras, “En poemo ĉi-tiea, oni
provas raporti la precizan momenton kiam io
ekstera kaj objektiva transformiĝas, aŭ
ekumas al io interna kaj subjektiva.”

Jen mia provo verki poemojn en 'bildiga'
stilo:

1.

“Vidataj ĉe marfluo apud San Francisko.
Mevoj duope starantaj sur flosanta ŝtupo:
Homoj okule gapantaj de krozanta ŝipo.”

2.

“Vidata tra fenestro dum nokta luntransiro
de l' ĉielo.

Flaveca luno moviĝanta mistike en la
firmamento

Ludema kato provas kapti pilkon sur vitro”

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Vi ankoraŭ estas ĉi tie

Ĉi-vespere, kun la pluvo
kiu lavas per akvego
la teron en novembro,
vi malrapide antaŭeniras
tra la vasta dezerto
de mia koro, kaj por mi
vi alportas novan deziron
denove rekoni amon.
Dankon! Vi ne malfruas.

Bela poetino

Bela poetino, estaĵo de litero.
Via dolĉa vivo estas plena de graco.
El via sankta animo, vi skribas.
Viaj vortoj lumigas la vivon.

Bela poetino, mi amas viajn poemojn.
Nun mi ne povas vivi sen vortoj.
El via animo, mi trinkas akvon de paco.
Viaj vortoj pentras mian vivon.

Jadranka Miric (Serbio)



Amikeca

En viaj okuloj ni.
sur via vizaĝo rido.
Antaŭ mi staras vi
en la manoj blua irido.

En la vazo blanka rozo.
Odoro miksanta kun via parfumo.
En angulo vi kun riverencpozo
kun etendiĝintaj manoj por brakumo.

Kara amikino mia!
Neatendita vizito via
maltrankviligas la koron. Memoroj
venas, el okuloj brilas feliĉlarmoj!

Ne estas amo sen dornoj

Banka lilio blankan rozon brakumis,
flustre tenere diris: `Ebriigos vin mi,
ne povas mi rigardi vin tian ``promesis li,
elverŝante akrajn larmojn al malgaja ŝi.

Tia ĉi amo kiel nia ne ekzistas!
Nur kreskas en fabelformoj,
plena de pikaj dornoj!
Dorno estas mia karmo,
povus mi esti nur via amara larmo!

Kien iras Eŭropo

Mia anim' modesta
jam delonge ploras.
Ja, nur mia lamento domfestas.

Malmulte da amo la granda zorgo estas.
Komprenemo kaj solidareco forestas.
Kontraŭe kore okcidentuloj satanon festas .

Matena roso

Promenas mi nudpieda
kvazaŭ mi solas en la tuta mondo..
dum venteto karesas mian hararon
kiu fuĝas libere al diversaj ventoondoj.

Sur herbejo bedo flora
odoras je freŝa parfumo naturkora ,
ofte vizitita de diligentaj abeloj .
kiuj por ni mielon umas , sen iaj peloj.

Elena Popova (Bulgario)



La mirakla papilio

Freŝa roza floro
dum matena horo
allogis intereson
en vivul' neforgesa.
Ĝi polvigis sukcese
la florojn silente.
Ne atendu mielon—
elflugis al ĉielo.
Nur belecon portas
la papili' senmorta.

Maro

Printempa maro
kun la vento kantadas.
Kisas la bordon.

La "mutaj" fiŝoj
kantas kaj gaje dancas

en ama ritmo.

La mar' somere
logas al senfinaĵo
per varmaj kisoj.

Aŭ nin invitas
al varma sternaĵo kaj
sunaj donacoj.

Aŭtune ploras
pro la soleco. Ĝi al
la laroj plendas.

La maro vintre
similas al oldulo –
nun forlasita.

Ĉi-jare pasis.
La vintro sur la varma
sablo kuŝetis.

Printempo 2022

Cikoni' en la
nest' tremas suprizita –
ankoraŭ neĝas.

Ne fore – milit'.
Mart' griziĝis pro timo.
Infanoj ploras.

Ploranta April'
pro homa nekontentec'.
La prezoj "flugas".

Milita printemp'.
La moralaj kvalitoj?
Ja monda krizo.

Malhelaj nuboj.
Du timigitaj birdoj
serĉas ŝirmejon.

La floroj– viva

bildgalerio. Pluvas.
Palmodimanĉo.

Favora fajro –
Kristo resurektis. La
Suno aperis.

Ivanichka Magharova (Bulgario)



La maro

(Impreso)

Ili iradis duope. Voĵeto malseka. Kruroj
dronas.

Manoj varmaj. Lipoj humidaj. Hararo
disĵetita.

Rideto karesas. Okuloj verdaj. Voĉo en la
silento.

La maro blua. Ondoj inundas. Sala la akvo.
Suno malantaŭ nuboj. Subiro alvenas. La
bordo dezertas.

La senfino lazuras. Profundas la maro. Ŝipoj
navigas.

Mevoj traflugas. Fiŝetoj saltetas. Rido
naskiĝas.

Nimfoj dancas. Kanto ama. Sablo odoras.
La lipoj ardas. Senbruas la emocio. Malĝojo
forflugas

Luna rideto. Unuigitaj la korpoj. Batas la
koro.

La papilioj flirtas. La animo festenas. Ardas
la korpoj

Vortoj senvoĉaj. La fino senvoĉa. La vivo
mallonga.

La amo eterna.

Vintra noktmezo
Soleca vent' postkuras
neĝan lavanton.

Senhejmsunsubir'

rigardas la fenestron,
ja tristis solece mi.

Glacia maten’.
Frost’ sur vitro. Li sola.
Kandelo brulas.

Fromaĝa fasto.
Mi pardonpetas panjo.
Ŝi prisilentas.

Jam mateniĝas.
Kupra kabal’ eniras
mian ĉambreton.

En la kameno
fajreroj estingiĝas.
Vino amaras .

Senhejma luno
aperis super l’ arbar’.
Birdoj raviĝas.

Belaj hirundoj
sur la telegrafdratoj.
Koncert’ por birdoj.

Senhejmsunsubir’
sur la montetoj vagas
amanta en lun’ .

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



La Knabino Karina

Mi pensas rememore al la jaro,
kiam ĵus mi estis dek sep ankoraŭ.
En nian urbon venis cirko-ĉaro,
mi vespere en la tendo vidis ŝin,
kiun mi neniam forgesis ĝis hodiaŭ.

La knabino Karina
estis bela kiel stelo
ĉe la volbo de ĉielo.

La knabino Karina
estis mia la unua granda am’,
kiun trovis mi en ĉi mondo iam.

Kun feliĉo mia koro ĉesis preskaŭ,
tiel alte sur la ŝnuro vidi ŝin.
Al mi ĵetis rozon ŝi ankoraŭ,
dirante: “Mi neniam forgesos vin”.
Malfacila estis tamen l’ adiaŭ,
mi ne plu trovis pacon ekde tiam.

— Esperantigis Yi Qiao surbaze de la germana ŝlagrkanto
“Das Mädchen Carina” de Georg Buschor (kantlirikisto), Rolf
Arland (komponisto) kaj Roy Black (popkantisto).
<https://youtu.be/ydaPuAy19qA>

Sperto pri delico

Sur kamparpado
delicon oni sentas
kun birdkverado.

Facile sata,
oni spertas delicon
dum vivo glata.

Delico brilas
lirlante kiel roĵo,
milde jubilas.

La verda stelo
dotas al ni l’ delicon
tra klarĉielo.

—laŭ metriko de japana hajko

Adiaŭo

Ekster la stacia longa pavilono,
apud la antikva vojo kiel fono,
herboj verdas vaste de prosper’.
Venteto karesas salikojn en vesper’,
apenaŭ aŭdeblas la flutsono,
la suno subiras tra montarsono.

Ĝis la fino de l’ ĉielo
kaj l’ anguloj de la tero,

mankas de intimaj bonamikoj jam
duon’.

Kun kruĉo da vino densa ĉe dispon’,
ni tostuj kun lasta ĝojo en libero,
ĉi-nokta sonĝo mornas pro adiaŭpelo.

— *Esperantigita surbaze de la ĉina adiaŭkanto de Li Shutong*
(poeto) kaj John Pond Ordway (komponisto).

Visar Zhiti



La arbara elegio

Estas jam ŝrumpinte la arbara surfaco
Kaj estas pliiĝita la surfaco de timo,
Estas ŝrumpita la arbara surfaco,
Malpli da bestoj estas nun.
Malpli da kuraĝo, malpli da fulmoj

Malpli da beleco.
Kaj la luno estas nekovrita

Kvazaŭ doloriga senvirgeco
Kaj poste forlasita.
Estas ŝrumpita la arbara surfaco

La surfaco de poezio, de sopiroj
Foliaj paroloj estas ja malpli
Kaj onidiroj pli.
Estas ŝrumpita la arbara surfaco,

La riveroj ne plu raviĝas,
La riveroj konfuziĝas,
Kvazaŭ zebroj en la zooparkoj, vidas nin
la riveroj.

Estas ŝrumpita la arbara surfaco,
Kaj la surfaco de la honto,
Kiom malmulte da honto ni havas nun,

Reklamoj kaj dilemoj

Magazenoj, kinejoj kaj gloroj,
Pliiĝis la surfaco de la urboj,
Ankaŭ la surfaco de la honto pliiĝis

Tutaj tiuj hontoj kiujn apenaŭ gazetoj
kovreblas

Sed daŭrigas la sekvontajn numerojn
Kaj en la sekvonta abono de la frenezeco

Ŝrumpiĝis la surfaco de la arbaroj
Kaj pliiĝis la direktorejoj pri la arbaroj

La surfaco de la amo ŝrumpiĝis
Kaj la birdoj havas mapli da loko
Por iliaj amoroj
Ili ja ne scipovas amori en la oficejo

Ŝrumpiĝis la surfaco de la vizaĝoj
Knabo pentras arbojn sur la muroj
Li pentras arbojn antaŭ miaj okuloj
Li faras la tatuon de la arbo
Sur la haŭto de ties maldika brako

Kiel la fino de dudeka jarcento
Tiel profunden li alfiksas la varmegan
pinglon kun farbo

Tiel ke la arbaro zumas ensange kvazaŭ
doloro
De vunda inflamiĝo.

Elalbanigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Jiang Kui (1155-1226)

GRILLOJ

—laŭ melodio *Ĝojo sub la ĉielo*
La poeto sola ĉantas siajn versojn,
jen alŝvebas trista grila zum’.
Rosoj malsekigas bronzajn pordoringojn,
musko tuŝas la putrandon per brakum’.

Tie kaj ĉi tie griloj ĉirpas triste
kvazaŭ plore ĉiam en pasint' kaj nun.
En ĉirpad' de griloj la sendorma ino
jen pretigas la teksilon. Tiam dum
ŝi ekrigardas montojn sur l' ekrano,
ŝia larm' ruliĝas pro soleca vivmallum'.

Ekster la fenestro pluv' kaj vento
furiozas intermite kun ululo.
Kial girlĉirpado ĉiam akompanas
sonojn de vest-lavklabado en obskuro?
La grilzumo certe vekas la ĉagrenojn,
ĉu en la loĝejo en aŭtun', ĉu dum veturo.
Tamen *Libr' de Poezi** entenas ĝian
belan priskribadon ja skizitan laŭ naturo.
La geknaboj, mantene la lanternon,
serĉas grilojn ĉe l' baril-angulo:
"Estas griloj tie ĉi!" kriante kun ridsonoj.
Se komponus oni kanton pri la gril-susuro
kaj ĝin ludus per kordmuzikilo,
certe oni aŭdus kanton tristan sen mezuro.

**La unua poemkolekto de la antikva Ĉinio.*

—laŭ melodio *Lanta kanto de plendado*

Salikaj flokoj ŝvebas ĝis la lasta peco
en vento blovanta kun susuro.
Kaŝite en la ombro malhelverda,
apenaŭ ŝia dom' videblas en obskuro.
Mia boat' forfloras laŭ rivera voj' sinua
inter malordaj veloj al nenia celo de veturo.
Salikoj ĉe la bordo vidas multe da vagantoj
disiĝi, per trankvila kaj silenta la okulo.
Se tiuj arboj havus emociojn, ili ne prosperus
farbite jen per tia malhelverd-tinkuro.

Ĉe sink' de l' sun' la alta urbo nevideblas
sennombraj montoj nure staras en pelmelo.
Amato ja foriris, sed li devas ŝiajn vortojn
memori: jen revenu frue pli kun fidelo,
ĉar timas ŝi, ke l' ĉarmulin' ne havas
protekton lian ĉe eventuala la danĝero.
Eĉ se ŝi havus akran glavon,
ŝi povus ne fortranĉi splenojn de kruelo.

—laŭ melodio *Lanta kanto de Yangzhou*

Ĉe pavilono de l' antikva urbo Yangzhou
deĉevaliĝis por ripozi mi pro laco
dum la etap' unua de vojaĝado mia.
Antaŭe pompis viv' la vasta spaco,
sed nun ĝi plenas je herbaĉoj, musko.
Ekde invadoj de tataroj kelkfojaj kun
minaco
eĉ dezertecaj lagoj, altaj arboj
malamus militadon jen kun dent-agaco.
Proksime al vesperkrepusko kornoj sonas
korŝire super la malplena urbo-karapaco.

Eĉ Du Mu*, virtuozo de versado,
se li revenus al la viv' reala,
li certe estus surprizita de la sceno
plagita, suferplena kaj amara.
Eĉ per talento majstra en poemkreado
kaj per bravura stilo en vortstoko mara,
li povus ne esprimi senton el la koro
nek ĝenojn pri l' ĉagren' sentimentala.
Ankoraŭ la Ponto Dudek-Kvar restas sama,
jam mutas ondoj kaj solecas luno pala.
Ĉe l' bordo ruĝaj peonioj kreskas pompe,
prezentas belon laŭ sezono ĉiujara,
sed kiu havus emon kaj inklinon
por spekti ilin en koloro senrivala?

**Du Mu (837- ĉ.852), poeto de Yangzhou, fama pro siaj poemoj pri la urbo kaj tieaj belulinoj.*

—laŭ melodio *Kaŝita aromo*

Antaŭe mi kutime ludis fluton
ĉe umearbo sub lunlumo klara.
En kia ajn malvarma tago
mi ĉiam petis al ŝi, mia kara,
derompi frondojn umearbajn
por aprecad' en neĝ' blankpala.
Sed mi oldiĝas kaj jam perdis
humoron de umeflor-aprecado joviala.
Trans bambuar' alŝvebas bonodoro
de kelkaj umefloroj al festeno ĉealtara
kaj ekmemoras mi tre freŝe
pri la paseoj en nebul' vuala.

Nun sude de l' rivero Jangzi
 ja regas vintra silentemo vere.
 Mi volas sendi umefrondon al ŝi,
 sed vojo longas malespere
 kaj nokta neĝ' jam bare amasiĝis.
 Kun tas' da vino en la mano, plensufere,
 mi jen faligas sangajn larmojn.
 La ruĝaj umefloroj senvort-maniere
 tuj vekas ĉe mi la memoron
 jen pri mi kaj ŝi, kiuj ja miele,
 mano-en-mane promenadis ĉe lagbordo,
 kie mil kaj mil umearboj ja prospere
 disfloris kaj lagakv' smeraldis froste.
 Petaloj nun forblovas ja kruele
 la vento pec' post peco sur la teron,
 ve, kiam ili ja aspektos tiom bele?

—laŭ melodio *Maldensa ombro*

Sur branĉoj de umeo floroj
 jadecaj nestas, kaj birdparo
 dormetas premiĝante unu al alia
 intime meze de frondaro.
 En fremda lok' mi vidas umearbon
 kun fono de bambuoj, jen en staro
 ĉe heĝo, aspektante svelte en vespero.
 La historio diras, ke belino en realo
 edziniĝis al norda huno-estr' por paco,
 ŝi ofte sopiremis kun sentimentalo
 al la hejmloka tero suda, kaj la norda.
 Animo ŝia eĉ reiris kun ornam-vualo
 dum luna nokto kaj fariĝis umefloro
 tutsola kaj dignplena en konduta klaro.

Okazis iam la palaca anekdoto:
 petalo umeflora falis jen leĝere
 sur la fruntmezon de princino,
 kiu en buduaro sonĝis bele.
 Pro tio l' modo de "petalfrunto"
 furoris en palaco ja modele.
 Ne kiel printemp-vento senkompata
 al umefloroj pompaj jen prospere,
 vi devas zorgi tiujn florojn
 kvazaŭ knabinon en or-domo vere.

Finfine la petaloj falos pec' post peco
 en ondojn ruliĝantajn laŭ akvflu' libere.
 Ve, kial oni hatas flut-arion ĉagrenvekan
 pri "petalfrunto" tre severe?
 Ĝis tiam oni ja ne povos flari
 aromon densan umefloran jen espere,
 ĉar ili jam pentritas sur rubando tola
 pendanta ĉe fenestro viziere.

Elĉinigiŝ



Veĵdo (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO TRIDEK-TRIA

Sub la ĉielo

§33-01

El la grandnombraj kleruloj ĉiu
 pretendas, ke tio, al kio li dediĉas, estas la
 perfekta vero, al kiu nenio povus esti aldonita.
 Kie do estas la natura leĝo, pri kiu la
 antikvuloj parolis? La respondo estas: "Ĉie."
 "De kie do venas la naturdoto? Kaj de kie la
 inteligenteco kaj la sagaco?" La respondo
 estas: "Estas kaŭzo por la naskiĝo de ĉiu
 saĝulo kaj por la apero de ĉiu saĝa reĝo, ĉar
 ĉio originas el la eterna Taŭo — la praa
 Unuo."

Tiu, kiu agas laŭ la fundamenta principo
 de la Taŭo, estas ĉiela homo; tiu, kiu agas en
 la spirito de la Taŭo, estas dia homo; tiu, kiu
 komprenas la esencon de la Taŭo, estas
 perfekta homo; tiu, kiu prenas la naturon kiel
 la originan fonton, la naturan dispozicion kiel

la bazon, kaj la naturajn leĝojn kiel la rimedojn por antaŭvidi la diversajn ŝanĝojn, estas saĝulo; tiu, kiu donacas bonojn en la humana spirito, distingas la pravon de la malpravo en la humana spirito, normigas sian konduton per la ritoj, reguligas sian temperamenton per la muziko, kaj instruas aliajn per bonkoreco, estas homo kun nobla karaktero. La sociaj roloj devas esti difinitaj laŭ la leĝoj kaj regularoj; la normoj devas esti starigitaj laŭ la sociaj rangoj; la kontrolado devas esti efektivigita per ripetaj ekzamenoj; la decidoj devas esti farataj per ĝisfundaj esploroj; la regnaj oficistoj devas okupi ĉiu la postenon al li difinitan. Preni la laboron kiel la regulon de la ĉiutaga vivo; konsideri la sinvestadon kaj la sinnutradon kiel ĉefan taskon, produkti kaj konservi la produktaĵojn, zorgi pri la maljunuloj kaj malfortuloj, pri orfoj kaj vidvinoj — jen la strukturo de la popola vivo.

Kiel perfektaj estis la antikvaj virtuloj! Ili kombinis sian naturdoton kun la akirita inteligenteco, sekvis la naturajn leĝojn de la universo, nutris ĉiujn estaĵojn sur la tero por atingi la harmonion en la mondo. Ili donis favorojn al la ordinara popolo, ĝisfunde konis la bazajn principojn de la Taŭo kaj sciis ilin apliki al ĉiaj aferoj, grandaj kaj malgrandaj, kaj en ĉiaj okazoj. Ili aktivaj faris sin sentataj en la ses direktoj (oriento, okcidento, sudo, nordo, supro kaj malsupro) kaj en la kvar sezonoj. Kun sia naturdoto kaj akirita inteligenteco ili povis kompreni ĉiujn ŝanĝigojn de la universo. Ili eksplicite esprimitaj opinioj estis reflektitaj en multaj antikvaj leĝoj kaj historiaj registroj; la spirito de tiuj ideoj entenita en *Libro de Poezio*, *Libro de Historiaj Dokumentoj*, *Libro de Etiketo kaj Ceremoniaro* kaj *Libro de Muziko* povas esti komprenata de la plejparto de la konfucanoj kaj konfuceanaj kleruloj.

Libro de Poezio esprimas la pensojn kaj la sentojn de la homoj; *Libro de Historiaj*

Dokumentoj registras politikajn eventojn; *Libro de Etiketo kaj Ceremoniaro* difinas la regulojn de la homa konduto; *Libro de Muziko* komunikas la ideon de harmonio; *Libro de Ŝanĝigoj* eksplikas la misteron de ŝanĝigoj inter la jino kaj la jango; *Analoj de Printempo kaj Aŭtuno* klarigas la hierarkion, la titolojn kaj iliajn funkciojn. La ideoj kaj opinioj de tiuj ĉi libroj disvastiĝintaj jam sub la ĉielo, estas praktikataj en la regnoj de la centraj ebenaĵoj de Ĉinio. Ili estis ofte citataj kaj pozitive komentataj de kleruloj de diversaj skoloj.

Kiam la mondo estas falinta en ĥaoson, la saĝuloj kun siaj sagacaj opinioj ne plu manifestiĝas, kaj unuecaj moralaj kodoj jam estas neeblaj. Tiam la plejparto de la homoj en la mondo inklina rigardi sin kiel neerarema kaj emas paradi per sia klero en ĉiu ebla okazo. Tio estas kiel la okuloj, la oreloj, la buŝo kaj la nazo, kiuj ĉiuj havas siajn respektivajn funkciojn kaj el kiuj neniu povas anstataŭi la aliajn; aŭ kiel la diversaj metiaj lertecoj, el kiuj ĉiu havas sian specialecon kaj povas esti aplikata en apartaj cirkonstancoj. Eĉ tiel, la apliko de ĉiu lerteco havas sian limigitecon. Ĝuste pro tio la homoj plejofte vidas nur unu flankon de la afero. Ili detruas la naturan ekvilibron inter la ĉielo kaj la tero, rompas la harmonion inter ĉiuj estaĵoj kaj misinterpretas la filozofion pri la Taŭo kreita de la antikvaj saĝuloj. Ili malofte kunfandiĝas kun la vera belo de la naturo kaj malofte harmoniigas en si la naturan dispozicion kaj la akiritan inteligentecan. Pro tiuj ĉi malavantaĝoj la doktrinoj de la mirindaj saĝuloj paliĝas kaj estas sufokitaj. Oni kutime penas kontentigi siajn dezirojn kaj rigardas siajn opiniojn kiel perfektajn. Kia tragedio!

La diversaj skoloj prenas ĉiu sian vojon de disvolviĝo kaj iras pli kaj pli foren de la Taŭo sen sin returni. Estas granda malfeliĉo, ke la kleruloj de la postaj epokoj neniam

povos vidi la originan simplecon de la universo kaj la moralan perfektecon de la antikvuloj. Rezulte de tio, la taŭismo neeviteble dissplitiĝos en la tuta mondo.

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske


Yi Qiao (ĉino en Germanio)

La klarluno

— laŭ ĉinesko *Kanto pri umefloroj**

Festeno
kun beno
okazas en ĝardeno.
Amikin’
kun bonvin’
korafablas,
ni tostas sen fin’.

Brizo flirte teneras,
ni brakumante kveras.
La klarlun’
en aŭtun’
milde lumas,
ni ebrias nun.



**Kanto pri umefloroj* (ĉine: *meihuayin*): ĉina fiksforma poemo kun 57 silaboj ((3a, 3a, 7a. 3B, 3B,

4x, 5B./7c, 7c. 3D, 3D, 4x, 5D). Interalie a kaj c laŭ ina rimoj, B kaj D laŭ vira rimoj, x=senrima.

Jadranka Miric (Serbio)

Naturo lernigas nin

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Junio
vere aŭtuna
veter’. Monsumaj pluvoj
ĉiutage kiel puna
mezurkomuna.

Amparoj
subakviĝis. Ve
al diligentaj homoj.
Akvo en la domojn! Tre
aŭ tro malbone.

En tiuj
situacioj
oni trovas heroojn!
Civiuloj savantoj
el pli nacioj!

Ekkreskis
solidareco.
Oni savis dombestojn!
Donaco kaj boneco
konata “eco”

ĉe homoj
iĝas amikec’.
Jam longe forgesita
vorto. Ju pli da ec’
des pli da bonec’!

Unu agrabla tago

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Somera
frua vekiĝo
tre agrablas al anim’.
Rapida ellitiĝo
por sunbruniĝo.

Sur plaĝo
frumatenuloj
jam kaptis bonajn lokojn.
Ĉion por siaj uloj
faris fraŭloj.

Odoras
riverbordo je
frititaj kukoj. Ĉio
allogas, nepre tie
antaŭ kaj poste,

Tuttaga
ĝoja banado
tre lacigas min. Plaĉas
kun libro promenado—
ĝia legado.

Dum suno
milde karesas
la vizaĝon venteto
tenere foliumas
libron. Krepuskas!

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Laimundas Abromas (Litovio)



Kiel mi komencis verki

Miaj konataj samideanoj kaj eĉ nekonataj esperantistoj ofte demandas min, kiel mi verkis mian unuan artikolon. Kaj ĉiufoje mi devas rakonti tiun saman historion. Por ne paroli vane, mi decidis ankoraŭfoje ĝin rakonti kaj per tio por ĉiam refuti similajn demandadojn. Jen kiel, ĉio okazis.

Kiel hodiaŭ mi memoras. Estis bela, aŭtuna tago. La suno sendis lastan varmon sur la teron. Mi estis bonhumora kaj decidis iomete promeni tra la urbo. La stratoj plenplenis je la homoj, ĉiuj ien rapidis,

kuris. Mi paŝis kaj ĉirkaŭrigardis, pro nenifarado. En mia animo estis trankvile kaj malplene. Bone. Vere, la paciencon mian ĝenis la kurtaj juĵoj. Tamen tio bagatelis. Necesas nur ŝajnigi, ke vi observas la vitrinojn, se vi volas returniĝi. Do mi paŝis sola mem, malrapide kaj pensis. Kion fari, se mi estas sola? Por ne barakti sin inter la homoj, mi decidis iri al urba parko. Tie estis jam kelkaj pensiuloj, kiuj ripozis sur la benkoj, kaj promenadis kelkaj junaj familioj, puŝantaj antaŭ si porinfanajn kaleŝetojn. Por iom ripozati mi ankaŭ eksidis sur unu el liberaj benkoj. Mi elpoŝigis lastan numeron de „Heroldo de Esperanto“. Sidis mi sur benko kaj per senmoviĝantaj okuloj rigardis al la gazeto. Mi profundigis en legadon kaj eĉ ne rimarkis, kiam aliris min iu viro.

—Bonan tagon, — li salutis min. —Ĉu mi povas eksidi apud vi?

Li estis mezaĝa viro kun brunaj lipharoj kaj kalva kapo. Mi kapjesis. Li sidiĝis sur benkon kaj ĝojis lastan varmon de la aŭtuno. Baldaŭ li ekrigardis min tiel atente, scivoleme. Kiu diris, ke ni, esperantistoj, ne estas interesaj al la mondo. Poste li demandis min:

—Ĉu vi legas esperantlingve?

—Nu, legas mi.

—Esperante?

—Nu, esperante.

—Vi?

—Nu, mi, — respondis mi surprizite.

—Tio estas laŭdinda! Tio estas interese! — parolis mia nova najbaro. —Mi estas redaktoro de la urba gazeto „La tempo“. Ĉu vi legas ĝin?

—Nu, mi legas ĝin. Ĝi estas interesa, aktuala, semajna gazeto, — konfesis mi.

—Estas bone, ke mi renkontis vin. —ĝojis mia najbaro, la redaktoro de loka gazeto. — Mi petas, bonvolu verki la artikolon pri Esperanto por legantoj de nia gazeto. Vi skribu pri via sperto en lernado de Esperanto, kial kaj kiel vi mem venis al Esperanto, skribu vi pri esperantistoj kaj esperantista movado, ĉu estas tia?

Por mi tio estis granda, neatendita surprizo. Sed kion fari? Por Esperanto mi devas tion fari, mi

devas oferti min. Kaj mi ekvolis min montri saĝa kaj demandis redaktoron:

—Ĉu vi scias, pro kio ĉinoj ne interkompreniĝas kun eskimoj?

—Pro tio, ke ili ne bezonas tiun interkompreniĝon, —respondis redaktoro.

—Ho, ne. Pro tio, ke eskimoj ne lernas Esperanton.

Ni adiaŭis kaj disiris. Revenante hejmen, mi aĉetis kajeron, botelon da „inko“, vi komprenu vinon, kaj skribilon.

Hejme mi eksidis ĉe la tablon, glutis glason da „inko“, malfermis kajeron, prenis skribilon kaj facile tuj skribis la unuan frazon „Mia amata Esperanto“. Sed tuj mi tre ekscitiĝis, ekploris kaj longe, longe rigardis tra la fenestron. Bedaŭrinde per tio finiĝis mia verka inspiro. La temo por mi estis malfacila. Mi komencis nervoziĝi, fajfi kaj, preninte la pipon, batmortigis blaton. Ĝi sidis surtable, apude kaj „movigante lipharojn, observis ĉion de mi skribitan kaj ridetis. Mi ĝin ne toleris. Tamen io estis ne tiel, kiel decas. Por ke estu pli facile orientiĝi en la afero, mi ĉiujn homojn dividis je du grupoj : esperantistoj kaj ne. Kaj ĉio tuj iĝis klare. Pri Esperanto multon diras tiu fakto, ke iu ajn deziranto povas iĝi esperantisto. Sed kion mi scias pri Esperanto ĝenerale: edzperanto, kongresoj kun kongresedzinoj, denaskaj esperantistoj, ago-tago, eternaj komencantoj, majstro Zamenhofo kun la netuŝebla fundamento, verdstelanoj, samideanoj, samidolanoj, delegitoj, sankta harmonio, interna ideo, pacaj batalantoj, nova sento...? Kaj mi komprenis, ke miaj scioj pri Esperanto estas ege breĉhavaj. Kaj ĉiujn tiujn mankojn kaj erarojn mi malkovris tute neatendite. Por miloj, milionoj da esperantistoj ĉio klaras. Sed por mi...? Hontu mi!

Kaj mi tuj ekstudis kelkajn gravajn verkojn pri Esperanto. Komencis mi de „Enciklopedio de Esperanto“ kaj finis per „Fundamento ... Tamen traleginte ilin, mi komprenis, ke mi nenion komprenis. Mi ekspiris, kraĉis kaj ankoraŭfoje relegis ilin... Ion tamen mi eksciis... Evidentiĝis, ke Esperanto estas la plej facila lingvo, tamen — ne facila.

Do mi eksidis por verki. Mi sidis ĉe la tablo tutan tagon seninterrompe ĝis noktomezo kaj artikolo finfine estis verkita. Matene, kun la artikolo enmane, mi venis redaktejon kaj eniris la kabineton de redaktoro. Ekvidinte la vizaĝon de redaktoro, mi komprenis, ke ĉimatene li estas bonhumora. Tion pruvis lia varma, amika manpremo.

—Kiel sukcesis vi?, — li demandis, montrante permane al mi la seĝon por eksidi.

Mi respektplene metis antaŭ la redaktoro mian artikolon. Li prenis ĝin kaj estime klinis sian kapon kaj komencis legi.

—Ĥe, — afable ekridetis li, apenaŭ leginte la unuan frazon.

Mi eksentis ŝajnan lian mantuŝon sur mia ŝultro. Bona komenco, pensis mi. Bona, kiel neniam.

—Ĥe, ĥe, ĥe,— redaktoro ŝajnis bonan komencon. —Trafkapable, trafe...

Mi enanime ekkantis.

—Ĥo,ĥo,ĥo, — daŭre ridis redaktoro. —Trafe, bele vi pri tiuj esperantistoj! Ĝuste tiel! Ho — rimarkinde! Ho, interese, — per krajono la redaktoro gratis sian kalvaĵon. — Ĥa,ha,ha,ha, —ektondris li rektiĝante sur la seĝo kaj viŝpurigante larmojn, — ho, ho, ho! Bravulo! Mi delonge ne ridis tiel. Kaj elpensu vi tiel! —ekkrietis li glutante aeron. —Ve-ra hu-mu-ro, — li entuziasme silabis.

—Do,ĉu vi publikigos? — modeste mi mallevis okulrigardon.

El tondra, kvazaŭ milĉevala bruanta ridego, restis nur subtila, mallaŭta rido, de tiu mallaŭta rido — ĝojinda rideto.

—Hmmm... jes. Tre bone verkita. Eĉ, mi dirus, tute normale... — parolis redaktoro.

Li denove kliniĝis ĉe mia verko.

—Ni analizu, kiel oni diras, de praktika, de objektiva flanko. Jen, ĉi tie, — li per krajono ekpiketis, — esence, verdire, ĝustas... Vi mem scias pri esperantistoj pli bone ol mi, tamen... Ĉu ne tro pike, a? Ili povas ofendiĝi, tiuj viaj samideanoj. Kontaktoj, bonaj interrilatoj... Vi komprenas? Kaj vi mem interrilatas kun ili...

—Nuuu, jes, — mi ne kontraŭis —Esence. Do, ĉu ni forstreku? — li demandis kaj per globkrajono

